


# nia vivo


*Niaj pordoj  
estas  
malfermitaj*



Informa bulteno pri la 43a H.K. de esperanto (1983)

## ORGANIZA KONGRES-KOMITATO

<i>Honora prezidanto</i> . . . . .	Moŝta Sro. D. Miguel Sancho Izquierdo
<i>Prezidanto</i> . . . . .	D. Jaime Benito Cedo
<i>Vicprezidanto</i> . . . . .	D. Víctor Ortiz Gratal
<i>Sekretario</i> . . . . .	D. Antonio Marco Botella
<i>Vicsekretario</i> . . . . .	D. Miguel Angel Rupérez
<i>Prezidanto de Jubilea Komisiono</i> . . . . .	D. Angel Saleta Tejero
<i>Kasisto</i> . . . . .	D. Adolfo Arcega Germes
<i>Informado kaj Propagando</i> . . . . .	D. Enrique Piquero Vázquez
<i>Ekspozicio kaj Muzeoj</i> . . . . .	D. Joaquín Bielsa Vispe
<i>Belartaj Aranĝoj</i> . . . . .	D. Emilio Pérez Gimeno
<i>Gastigado</i> . . . . .	D. <sup>a</sup> Herminia Gil
<i>Ekskursoj</i> . . . . .	D. <sup>a</sup> Antonia Lapuerta Palacios
<i>Administrado</i> . . . . .	D. <sup>a</sup> María Pilar Sancho
<i>Junularaj Aĵeroj</i> . . . . .	D. Miguel Angel Martín



**FRATECO**

esperanta  
societo

S. VICENTE DE PAUL, 1  
ZARAGOZA (HISPANIO)

## TUTKORA INVITO

Gesamideanoj:

Alproksimiĝas jam la momento, kiam la veterana Societo «Frateco» de Zaragoza, devas festi sian 75an jardatrevenon. Tio okazos ĝuste en la venonta jaro 1983, do malproksima en la tempo tiu 1908 kiam la glora triopo: Rafael Benitez, Agustín Montagud kaj Emilio Gastón fondis nian Grupon.

Nia penso estas, ke la plej bona omaĝo kiun ni povas oferi al la bravaj fondintoj kaj al tiuj kiuj daŭrigis la meritoplenan taskon gvidi nian Societon dum 75 jaroj, estas, organizi en Zaragoza la Nacian Kongreson kaj kunfesti la eventon kamaradece kun ĉiuj homoj de la diversaj hispanaj regionoj, kaj ankaŭ tute same, kun tiuj multenombraj samideanoj kaj amikoj niaj el aliaj landoj kiuj sin sentu solidaraj kun ni, kiujn ni ĝoje akceptos kaj penos fari ilian restadon por ĉiam neĉorgesebla.

La Organiza Kongresa Komitato kiun mi prezidas, pretendas prepari Kongreson kiu estu memorinda por ĉiuj, kompreneble mi honeste ne povas certigi al vi ĉu ni atingos nian celon, sed estu certaj, ke ni faros nian eblon por realigi tion.

La marko kie ni enkadros nian agadon estas Aragono, kies belecoj ankoraŭ ne estas sufiĉe konitaj de la plejmulto kaj povas surprizigi al tiuj: Zaragoza estas dumiljara urbo, samtempe antikva kaj moderna, kiu konservas historiajn restaĵojn tre interesaj, ni metu kiel ekzemplo la palacon Aljafería, la nura monumento kiun oni konservas ankoraŭ relative kompleta pri muzulmana arkitekturo de la regnoj «Tajfoj», kaj en sama konstruaĵo, inter aliaj admirindaj belecoj, la tronsalono de la Katolikaj Reĝoj, ampleksega salono ornamita de elementoj gotikaj kaj mudeharaj kaj la emblemoj de la Reĝoj kiuj akiros famon: jugo kaj sagoj kaj la lemo «tiel rangas»... Multenombraj aliaj belecoj vi povos sendube admirii ĉe ni: Interesaj Belartaj Muzeoj, belegaj preĝejoj, admirindaj monumentoj, kune al modernaj avenuoj, belaj ĝardenoj, kaj amuzoj la plej diversaj.

La Kongreso ankaŭ prezentos al vi singularan Ekzpozicion, precipe filatela, kie vi povos admiri la laboron kaj interesajn instruajn kombinojn kiujn oni povas fari rilatante certajn eventojn de nia Esperantisma mondo kun filatelio. Preskaŭ certe ni ekskursos al la admirinda parko Ordesa, kie ĉiu ekskursanto trovos la koncernan gvidanton por marŝi laŭ propra forto kaj admiri unu el la plej belaj lokoj el naturo iam videbla.

Nia projekto estas alternigi laboron kaj amuzon en prudentaj dozoj, ĉar ankaŭ la laborprogramo estos sufiĉe densa.

Kun tiu perspektivo, ni invitas al vi, karaj gesamideanoj, partopreni la proksiman Kongreson en Zaragoza. Vian ĉeeston, ni konsideros, kiel la plej bona premio kiun «FRATECO» ricevos en sia Jubileo.

Je la nomo de la Organiza Kongresa Komitato kaj de la Zaragoza esperantistaro, mi antaŭdankas vin.

JAIME BENITO CEDO  
*Prezidanto*



Torla, — La pitoreska vilaĝeto antaŭ-pordo de la bela parko Ordesa.

**ORDESA**  
*atendas vin*

## O R D E S A

Unu el la plej allogaj elmontroj de naturbeleco kiun mi iam vidis estas la valo Ordesa, kie preskaŭ certe, la partoprenantoj de la venonta Zaragoza Kongreso ekskursos kompletan tagon.

La nacia parko Ordesa, 2046 hektaroj, apartenanta al la meza Pirineo, estas unu el tiuj lokoj kiujn nur unu sola fojo vizitita neniam plu estas forgesebla, ĉar kunigas, al la okulfrapa impresado de viveco de la koloroj, la ŝanĝanta fizionomio de diverseco en la ĉarmo de la kontrastoj. Ĉio estas tie singulara kaj unika: sovaĝa kaj tamen milda, grandioza kaj pro tio simpla, bela en la linio, en la koloro, en la perspektivo, en la etoso...

Bonvolu veni de mia mano por viziti ĝin, laŭ mi ĝin vidis en tiu unua fojo kiun mi tiel plaĉe rememoras:

Oni povas diri ke la valo Ordesa komencas en la pitoreska vilaĝo Torla, tie verdas ebenaĵo, kies malgrandaj bedoj anoncas vin ke la homo laboras tiun grundon en sia propra profito. Serene vi povas jam decidi vian unuan elekton, ĉu sekvi aŭtomobile la ŝoseon kiu dum sep kilometroj kondukos vin ĝis la parko mem, ĉu forlasi vian veturilon, trapasi kaprican lignan ponteton kaj sekvi dekstren vojeton rajdanta inter la montaro kaj rivero Arazas, unu el tiuj belaj riveroj pirineaj de kristalaj akvoj, kiuj rapidas saltante de ŝtono al ŝtono kvazaŭ serĉanta avide trankvilon kaj ripozon oni ne scias kien.

La nura diferenco inter la granda ŝoseo kaj la mallarĝa vojeto estas ke, aŭtomobile, la admirinda pejzaĝo rapide forflugas kiel en unu el tiuj filmoj de nia civilizita mondo. Se vi iras piede tra la sovaĝa vojeto, viaj okuloj palpas la belecon, viaj pulmoj enspiras la puran aeron, vi sentas la plezuron kontakti kun naturo: ekde la malprofundaj kaj klaraj akvoj la trutoj rigardas vin surprize; inter la pinarboj ŝteliras susuroj kiuj komunikas vin konfidencon de arbaroj kaj primitivajn kadencojn; la silentoj, plena de la mildaj bruetoj de la kanto kaj flugo de birdoj, invitas vin ĝui en via interno, de viaj propaj sentoj kaj pensoj kiuj sugestas vin la ĉirkaŭanta beleco. Estas ja alia mondo kiun vi reale vivas, sen artifiko kaj malpurigoj, serene, plaĉe, plenplene libera.

Sed mi ne volas tro influi en tiu decido, la granda ŝoseo kaj la mallarĝa vojeto, ambaŭ belaj, kondukos vin al la sama loko: ampleksa kaj malfermita spaco kie oni devas forlasi la veturilojn. Vi jam estas en la parko, kaj estonte vi devos ĉiam piediri, sen alia ebla elekto. Tie mem, maldekstre, sur la verda herbotapiŝo kiun protektas miljara arbaro, ĉe ties ombro, ekzistas granda paŝtejo kie vi povos trankvile ripozi unu horon, eble du, aŭ la tutan tagon, tio ne gravas, ĉar la loko estas paradiza. Tamen se vi sentas tiun maltrankvilon kiu puŝas vin vidi ĉiam iom pli, sciu ke vi trovos ankoraŭ tie, en Ordesa, vidindajn belecojn kiujn sen tro da penado ravis vin, do ekmarŝu norden tra vojeto apudrivera kaj baldaŭ vi alvenos al krucvojo kie sub ligna figuro de virgulino Pilar vi trovos du indikilojn: maldekstren al Cotatuero, dekstren al Soaso. Via vojo estas tiu ĉi lasta, do daŭrigu vian marŝadon kaj tuj vi ekrimarkos la deklivon de la tereno kaj la vojeton kiu atentinde mallarĝiĝis kaj zigzagas. Tiu vojeto, kun la oportunaj indikiloj, kondukos vin ĝis la akvofaloj, temas pri rivereto kiu venas de la supro rapida, postlasante mallarĝan kanyonon por sin ĵeti en kuraĝa salto en la malplenon, eble serĉante sian liberigon. Tra sama pasejo, kaj kun similaj motivoj, grandaj amasoj da glacio falis tondre dum printempo kaj eble ankoraŭ restas grandaj blokoj tie, ĉe la malsupro, duonkaŝitaj post la verda kreskaĵo kaj la giganta ĉevalvosto de la ŝaŭmanta akvo.

Sed la spektaklaj akvofaloj neniel estas la nura beleco de tiu loko, vi estas ja en la interno de granda arbaro, kies denseco permesas sin kaŝi interesaj bestoj kaj birdoj, kaj ne malpli interesa flaŭro, sed pri tio ni ne parolos hodiaŭ ĉar ili ne estos videblaj de vi dum via rapida ekskurso, do daŭrigu vian marŝadon ĉiam supren, kaj postlasante la akvofalojn, post kelkaj minutoj nur, vi sentos vin en la impresiiga silento de tiu arbaro. Temas pri kio iu elstara ĵurnalisto nomis, antaŭ ne multe, kiel «la katedralo de la arbaro», indikante tiamaniere la nesupereblan saĝon de naturo por harmonigi tie, rokojn, arbojn kaj montkreskaĵojn. La parfumo de malseka bukso estas intensa, kaj ĉiuj la koloroj estas tie reprezentataj laŭ majstraj kaj nereprodukteblaj nuancoj, kiujn la preskaŭ nevidebla suno generas kiam penetras inter la diverskoloraj folioj, ĉar tie vi trovos apud la sovaĝan pinon, abiojn kaj nigran pinon, kiuj estas normale renkonteblaj, grupojn da fagojn, avelujojn, kverkojn, tiliojn, fraksenojn, kaj eble ankoraŭ aliaj specimeĵoj kiuj eskapis al mia observo, ĉiuj ili kun la branĉoj kaj la rigardo etenditaj ĉielen, sopirantaj la luman favoron de la astro-reĝo.

Se vi obstine kaj rave persistas marŝi konstante supren, vi observos ke la arbaro iom post iom maldensiĝas, kaj la



arboj estas anstataŭitaj de rokoj, la valo mallargiĝas por eniri en longa kanono, ĉe kies malsupro aperas denove rivero Arazas, kiu rapidas, zigzagas inter grandaj ŝtonoj, saltas brave inter murmuroj kaj kristalaj rebriloj. Vi alproksimiĝas al la giganta cirko Soaso, sed antaŭ vi devos admiri grandegan ŝtuparon de rokoj, kiun la rivero saltas de ŝtupo al ŝtupo, kreante unu el la plej originalaj formoj el beleco, kiun vi sendube iam malfacile povis vidi, temas pri la tiel nomitaj «gradas de Soaso».

Kiam vi postlasas tiun spektaklon, vi rimarkas ke ĉirkaŭ vi la arboj vaporigis, malaperis, eĉ unu sola ne plu estas videbla, kaj grandegaj rokoj limigas vian horizonton, kaj vi sentas ke vi malgrandiĝas samgrade kiel la vertikalaj muro-rokoj gigantiĝas. Via rigardo nur povas promeni de la ĉielo bluluma al la rivero, ĉiufoje pli infana kiu sin kaŝas en la malproksimo. Sub tiu impreso vi eniras en la gigantan cirkon de Soaso: Ĉio estas tie grandioza, eksterordinara, kun egaj dimensioj vertikalaj, kalva je arboj, ĉio estas regata de impresiiga kolosalismo kiu sentigas vin mem sensignifa, senhelpa estaĵo, iun kiun eble la malproksima gento forgesis por ĉiam. Ĉe la fino de tiu ovala cirkego, granda akvofalo transformas fantazion en realo sin montranta sub la formo de giganta akvo-ventumilo.

Samideano, kiam vi estos en Soaso, eble estas alveninta la ĝustan momenton por ke vi rekonsideru pri la rezervo de viaj fizikaj fortoj. Kalkulu ke vi devas ankoraŭ reveni piede kie vi komencis, tamen se vi ankoraŭ sentas vin optimisma kaj deziras daŭrigi vian marŝadon, sciu, ke tre proksima al tiu akvofalo estas ligna ponteto kiun vi devos preterpasi, kaj proksima al ĝi, krucvojo. Maldekstre, tiu vojeto kondukos vin al la rifuĝejo Goritz, 2.300 m. alta, pli ol unu horo de senhalta suprenmarŝado, kaj lasta ŝtupo por ripozi se via celo estas atingi la plej altan montopinton de tiu komarko: Monte Perdido, 3.355 metroj alta. Se vi ne estas sperta montgrimpulo, mi konsilas vin sekvi la dekstran vojon kiu kondukos vin al la tiel nomita «faja de Pelay» kiu permesos vin ĝuadi la belan panoramon de la tuta kanono, kiun vi iam piediris malsupre, ekde kornico situata je 1.837 metroj alta. Ekde tiu vojeto de «faja de Pelay» vi povas vidi miniaturo riveron Arazas kiu saltante gaje malaperas je la fino de la paradiza valo inter la montoj Otal kaj Tendeñera; dekstre, tiun de Cotatuero, kaj sur ĝi la Brecha kaj Casco de Marbore, kaj je ambaŭ flankoj la Fraukata, montopinto Tobacor kaj Peña Gallinero. Okcidente, vi povos percepti la cirkon Carriata, Tozal del Mallo kaj Mondarruego, kaj oriente la tri montopintojn Tres Sorores kaj Marbore.

Unu, du, tri, aŭ eble multenombraj aliaj pliaj paĝoj, oni povus plenigi, por esprimi al vi kelkajn el la multenombraj belecoj de Ordesa, neniam estus tro se vi sciis tion fari iom fidele, sed permesu al mi antaŭ ol fini insisti: bonvolu ne iri pli longe ol viaj fortoj permesu al vi, ĉar vi povas ruinigi vian ekskurson, kaj ĉar ĉe la ebenaĵo aŭ akvofaloj, ĉe la arbaro aŭ en la cirko, en Goritz, «la faja de Pelay» aŭ ce la montopinto Perdido, vi povas pasi neforgeseblan tagon, se vi perdas variecon certe gajnos intensecon. Sen ia ajn dubo, restante tie kie vi decidu, Ordesa restos ĉiam por vi, neforgesebla.

ANTONIO MARCO BOTELLA





La Jota. — Pentrajo de Martín Bagüés. La jota estas la plej alta esprimo de la aragona folkloro.

## ARAGONA FOLKLORO ANTAŬ LA ZARAGOZA KONGRESO

Preskaŭ ĉiuj vi konas sendube, la grandan prestiĝon de la Aragona folkloro, kiu atingas atentindan universalan nivelon. Multaj el vi eĉ povis ĝui la admirindan spektaklon kiu ĉiam signifas tiaj elmontroj, precipe en danco kaj kanto de la tiel nomita aragona «Jota».

La vorto «Jota» (prononcu hota) ne havas ĝustan difinon nek klaran originon: oni akceptas ke ĝi devenas de la araba radiko «jot» kiu povas signifi, ĝojo, ĝoja salto, gaja kaj spontana esprimo. Alia probable origino povus esti, ke la «Jota» formiĝis laŭ ĝi estas nun, post longa evoluo tra la tempo de sinsekvaj kontribuoj de tiuj kiuj aktivis en tiu folkloro parcelo.

La «Jota» ekzistas en ĉiuj la hispanaj regionoj, sed estas en Aragono kie post jarcenta tradicio akiras specialajn kaj proprajn profilojn kiel alta esprimo arta kaj emocia de la temperamento, karaktero kaj psikologio de la aragona gento.

La aragona «Jota» kiel kanto, kapablas esprimi laŭ maniero tute originala la plej profundajn sentojn el la homa spirito, jen kial oni povas ĝin traduki kiel kanto, kiel verso, kiel esprimo el protesto, ribelo, amo, batalo... La stilo estas brava, korŝira, aperta, negenufleksa, nobla kaj plena je energio kaj vivanteco.

La danco enhavas similajn kvalitojn kiu sin tradukas en certa facilmoveco viva kaj eleganta kiu altiras tuj la atenton kaj admiron, sed oni devas substreki rimarkindajn diferencojn eĉ en la Aragona Regiono mem: eleganta kaj serena tiu danco de Teruel; pli brava kaj vibranta tiu de Huesca; rapida kaj avidoplena tiu de Zaragoza...

Kvankam la famo de la aragona folkloro ĉiam rilatas la «Jota»-n ekzistas ankaŭ aliaj formoj tre interesaj en tiu parcelo kiel estas: dances, seguidillas, paloteados, vals-jota kaj multenombraj aliaj kiujn eble vi havos la okazon admiri dum nia Kongreso.

Artaj Asocioj, Grupoj diversaj kaj individuaj specialistoj studis, kaj ankoraŭ studas, la historion de nia folkloro, anecstraj moroj kaj kutimoj el pasinto kiuj originis tiun fenomenon. Elstara inter tiuj Grupoj estas «Baluarte Aragonés» (Aragona bastiono), kiu spertas sukcese tiujn artajn esprimojn kaj akiris ĝustan famon kiel unu el la plej bonaj.

Tiu Grupo omaĝos nin okaze de nia Jubileo kaj plezuri-

gos nin per sia Arto dum nia Zaragoza Kongreso. Jen ĉi sube malgranda noto pri tiu Arta Grupo:

«Aragona Bastiono» sin prezentis antaŭ la publiko unuafoje, en Teatro Argensola de Zaragoza en la jaro 1979, kaj ekde tiu momento jam penis tion fari ne kiel komerca aktivado sed kiel digna misio. Fidele reprezentis la tradician aragonan «Jota», intencis evoluigi ĝin, modernigis malnovajn stilojn el la antikva folkloro kaj scenigis dancojn kaj kantojn el malnovaj tradicioj kaj komarkoj forgesitaj, tiamaniere ke post ne longa tempo ne nur interpretas sukcese la klasikan jota sed transformis la Grupon en arta folkloro baletto, veran admirindan spektaklon kiu ebligas ĝin sin prezenti publike ofte en Teatro Principal de Zaragoza, kaj tuj sekve, en Santander (Teatro Cinema), San Sebastián (Teatro Victoria Eugenia), Murcia (Teatro Romea), Cáceres (Teatro Astoria), Pamplona (Gayarre), Burgos (Gran Teatro), Logroño (Moderno), Teruel (Marín) kaj aliaj.

En la jaro 1980, en Antverpeno, gajnas la unuan premion dum la XVI Europeade de folkloro, kie konkuris 82 Grupoj de la tuta Eŭropo.

La Ĝenerala Aragona Diputacio, aŭtonoma aragona registaro, elektis la Grupon kiel unua folkloro aragona baletto, kaj komisiis ilin la promocion de la aragona folkloro ĉar ili posedas propran Akademion.

Tiuj sukcesoj permesis «Aragonan Bastionon» sin prezenti en Sala Pleyel de Parizo, kie oni opiniis «temas pri nova koncepto pri folkloro», kaj tuj sekve ankaŭ en Passage 44 de Bruselo, kie ricevis tre favoran akcepton kaj oni konsideris «ion pli ol folkloro spektaklo».

Multenombraj premioj ŝtupas la iradon de «Aragona Bastiono» kies listo estus impresiiga dum tiel mallonga tempo.

La direktoro kaj koreografo estas José Miguel Pamplona, vera specialisto en folkloraj temoj, kaj sendube la plej talenta kaj elstara koreografo el Aragono, kies scenigoj, inter aliaj, «Iun nokton en Calatayud», «La sorĉistino», «Trust de Tenorioj», kaj la popolaj dancoj «Bolero de Albalate», «Seguidillas de Goya», «Danco de olivistino» kaj aliaj, donas ideon pri la kapabloj kaj altaj kvalitoj de la unua gvidanto de la Grupo.

Se vi, kara leganto, venas al la Zaragoza Kongreso, certe vi povos konstati ke ni ne vane laŭdis la artajn ecojn de tiu folkloro Grupo.

IGNACIO MARTÍN BORROY

Kolekti poŝtmarkojn, kiel ĉiuj simplaj aferoj estis nekomplika arto kaj sen pretendoj. Kun absolute persona kaj altruisma esenco. Kiam tiu kolektemo estis sufiĉe propagandita, la interŝanĝo de poŝtmarkoj, limigo de la unuaj preskavantoj kaj la leĝo de la oferto kaj mendo-peto estigis la pasigilon kiel gajno-riĉan komercon. Ĝis tia grado estis ĝia graveco, ke la tago estis alveninta, kiam posedi kolekton de la tiel nomataj «Universalaj» estis malpermesate por la 99 % de la filatelistoj.

Kompense naskiĝis tio kio ordinare estas nomata Temaro kaj tion kion ni perdis laŭ amplekso, ni gajnis pri kreiteco kaj sperto aŭ instruistiĝo. Mi eksplikos: el komuna trunko «la temo» samkiel ĝi estu nomata papilioj, hundoj, katoj, aviadiloj, militistaj kostumoj, famaj homoj, verkistoj, k.t.p. Disetendiĝas la lundamentaj branĉoj. Papilioklasoj, hundo-rasoj, k.t.p., por alveni ĉe la plej apud-flankajn vojojn; ni citu ekzemple, Europajn, Afrikajn, Aziajn papiliojn, fervojojn, stacidomojn, fervojŝanĝiloj, k.t.p. Ĉio tio ĉi, grupigita estas fruktodona. La sperto tra la poŝtmarka prezentado de ia konkreta temo pri la homar-historio, la kulturo, scienco aŭ la arto.

Tiu ĉi simpla skemo kiun ni eksponas kiel esperantistoj estis la cel-vojo, por publike elmontri la kulturan enhavon de Esperanto kaj ĝian propran ekzisto-kialon. Kun tiu ĉi animostato ne esperu ke ni kovru la murojn per kvadrataj metroj da afiŝoj kaj stampiloj, sed sekvante la Esperantan temaron vi vidu jen suben en la poŝtmarkoj.

Lingvistoj kaj homoj al kiuj la ideo de lingvo Internacia interesis kaj laboradis pri ĝi. Akademianoj kiuj alportis pri la temo sian scion, sian intereson kaj siajn ideojn. Vi roj kaj virinoj apartenantaj al ĉiuj socikondiĉoj, kiuj pro iu ajn kaŭzo donacis ion por Esperanto aŭ por la ideo de Lingvo Internacia. Ĉieslandajn literaturajn aŭ beletrajn verkojn kiuj estis tradukitaj al Esperanto kun la sigelmanko de la aŭtoro.

Kompreneble, ne povus manki la vera marko de poŝtafranko kiu estis emisiita en pluraj landoj, ĉu honore al ĝia aŭtoro, ĉu pro aliaj diversaj kaŭzoj aŭ motivoj.

Kaj finfine stampiloj sur kiuj ni povas legi, la agad-vivon de Esperanto, kun ĝiaj kunvenoj, renkontiĝoj, enlandaj kaj internaciaj kongresoj, fervojistaj kongresoj, fakaj grup-kunvenoj, Jubileoj pri la Naskiĝ-dato de Dro. Zamenhof, S.A.T. kongresoj Universitataj konferencoj aŭ seminarioj, k.t.p.

Jen estas nia ambicio kaj klopodemo. Eble ne estas facile por ni formigi ĝin en palpeble evidenta realeco. Nu, se la simpla pordo-frapo de la scivolemo kaj amo al kolektado, estas sufiĉa motivo kaj efika alvoko por ke iu ajn el vi sin decidu vidi ĉi tiun ekspozicion, kaj ĉeesti al la Nacia Esperanta Kongreso de Zaragoza ni estos atingintaj unu el niaj plej karaj deziroj, pro kio ni siĝcere antaŭdankas vin.

Dro. JOAQUÍN BIELSA

## PAROLAS LA JUNULARO

Gejunuloj:

Ni, la zaragozaj esperantistoj, absolute ne rezignas nian protagonismon okaze de la proksima Nacia H.E.F. Kongreso de Zaragoza kaj 75an datrevenon kiun ni samtempe devas celebri ankaŭ dum somero de 1983.

Nia projekto iras paralela al tiu de la «barbuloj», kaj certe ni penos por ke tiu Kongreso signifu por ni, firman paŝon antaŭen en nia progresiga marŝado kiel junaj esperantistoj organizitaj, kaj en tiu senco ni preparos propran programon kiu interesu al ni ĉiuj.

Nia intenco estas, organizi tendaron aŭ allogan restadejon kie ni ĉiuj kunvivos dum la kongresaj tagoj en komuna laboro, distro kaj amuzo: Dum la tuttaga ekskurso, kelkaj el ni, gvidos la diversajn grupojn de kongresanoj tra la pluraj trajektoj kiujn ni preparas tra Parko Ordesa. Specialaj noktaj amuzoj, interesaj ludoj, distraj kolokvoj instruaj studoj, resume, ke ni preparas amuzan kaj laboran programon por tiu evento. Tamen, kvankam nia decido jam estas adoptita, ni dezirus ke tiu programo estu ne nur nia, sed via kaj nia, tio estas de ni ĉiuj, jen kial ni proponas al vi, junuloj, bonvolu sendi al ni, sugestojn, proponojn, ideojn kiujn iamaniere helpu al ni en la preparo de la citita programo.

Plezure ni atendas vian kontribuon, kaj tuj sekve, vian partoprenon en nia Kongreso!!

LA JUNULARO DE «FRATECO»



## PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONGRESO

### *Unua tago (postagmeze)*

Akceptado de gekongresanoj.

Vizito al la Ekspozicio.

Nokte. — Interkona vespero: dancado, recitado, k.t.p.

### *Dua tago*

Ekzamenoj.

Kunveno de la Estraro de H.E.F. kun la delegitoj de Grupoj.

Inaŭgurado.

Vizito al la Provinca Muzeo, «Aljafería», Katedraloj, k.t.p.

Folkloro festo.

### *Tria tago*

Fakaj kunvenoj

Internacia konferenco.

Omaĝo al la veteranoj.

75 Datreveno.

### *Kvara tago*

Ekskurso al la Nacia Parko Ordesa.

Oficiala Foto.

### *Kvina tago*

Ĝenerala Asambleo de H.E.F.

Oficiala Bankedo.

Arta Esperanta festo.

### *Sesa tago*

Duontaga ekskurso.

Vizito al la naskiĝdomo de Goya.

Projekcio filmoj de la plej gravaj pentraĵoj de Goya.

Solena fermo de la Kongreso.

# 1a FILATELA ARAGONA EKSPOZICIO PRI ESPERANTO

